



Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, 6-a de Februaro 2017

Ĉeestantoj: Amri Wandel, Jehoŝua Tilleman, Eldad Salzman, Matilda Landaŭ, Dror Gaon, Ŝlomo Ŝaĥar, Asaf Ĥefec, Gabi Zeevi. Gasto (parte): Lea Kudevitzki

Protokolo de la antaŭa kunsido (9-a de Januaro 2017) – komentoj, kontrolo pri plenumado

Raportoj:

- a) Aperis en revuo Esperanto 1/4-paĝa dorskovrila anonco pri la IK en Aŝkelono, la memorlibro de Josi kaj aliaj varoj de ELI (en la novembra n-ro, rete aperinta la 1.2.2017).
- b) Amri sendis subvenci-petojn por la filmo pri Zamenhof de Zachi Schiff al du E-fondusoj: ESF (Usono) kaj Hodler-68 (europa). ESF rifuzis, Hodler-68 konsideras (Ans Bakker, la prezidantino de H68 respondis pozitive). Tiucele Amri tradukis en E-on la 10 paĝan skripton. Estas petata sumo de 2000 eŭroj por 5 minuta prezento.

1. Finacoj (Ŝlomo)

- a) Diskuto pri la financa raporto kaj buĝeto senditaj de Ŝlomo (pasintsemajne) - *la bilanco estas akceptita unuanime.*
- b) Raporto pri la esploro aĉeti oficejon: Ŝlomo petis hipotekon de 36 bakfilioj, multaj ne respondis, aliaj petis diversajn dokumentojn: li devos pritrakti kun kelkaj.

2. La 18-a Israela Kongreso, 2017, Aŝkelon (Amri)

- a) **Aliĝoj:** ĝis la fino de januaro Amri kaj Jael ricevis mendojn por 21 ĉambroj kun 41 loĝantoj, el ili 2 nur por vendredo, kaj 7 eksterlandanoj (el Litovio, Latvio, Rusio, Germanio kaj Usono). La bahaa familio venos nur en decembro, do ne aktualas por la IK.
- b) **AK/PK:** Amri mendis la gastejojn por la antaŭkongreso en Jerusalemo, Morta Maro, Eilat kaj Jordanio (7 personoj: 5 eksterlandanoj, 2 israelanoj – Amri kaj lia filo, Ran). Por la PK aliĝis nur 2 personoj, Jehoŝua mendis du noktojn en Haifa, en Port Inn.
- c) La prezoj de pakita tagmanĝo en la hotelo estas tro altaj (50 NIS), do, ni trovu alian solvon.
- ĉ) Restoracio por ĵaudo vespere: eble ĉe la apuda plaĝo.
- d) Ŝlomo devos pagi al la hotelo por 2 ĉambroj (el la mendataj)
- e) Vizitoj: ĉi-momente oni ne aranĝas vizitojn en la loka elektrocentralo. Amri kontaktos kun la turisma direktorino de la municipejo rilate tion kaj aliajn temojn.

2/...



3. Eldonado kaj libroj (Amri)

a) La unua eldono de la memorlibro pri Josi elĉerpiĝis - UEA vendis la tutan stokon kiu restis en la Libroservo post la UK en Nitra (entute 15 ekz.) Ni povus sendi pliajn – sed la sendokostoj estas tre altaj. Eble iu povus preni kelkajn al UEA? (Oded baldaŭ veturos al Nederlando)

b) La dua eldono estis presita je 50 ekzempleroj: 23 estis disdonitaj dum la ZV, sed nur 5 aliaj membroj reagis al la demando publikigita en ELI-listo, kiu deziras ricevi ĝin (senpage por kotizantaj membroj). Do restis ĉ. 20 ekz. Kelkaj pliaj estos verŝajne disdonotaj dum la IK, kelkaj mendotaj eksterlande, sed certe ne estos bezonataj 100 pliaj ekz. kiujn oni planis presi. *Ni presu laŭbezone* (pri la prezo necesos negoci, ĉar la nun prezo de 55 NIS estis fiksita laŭ devontiĝo presi 200 ekz.).

c) Amri prilaboras IE-162/163, aspiras produkti duoblan n-ron vintro 2016/printempo 2017 por disdono dum la IK. Laŭ la januara decido, kontraŭ rekompenco. La du provlegantoj ankaŭ meritas rekompencon, ili faru proponon kaj ni decidus venontfoje.

ĉ) Alvenis la 3 ekz. de "La Eta Princo", kiun ni mendis de UEA. Unu ekz. ni provizu al Oded por eksponi en la brokanta librobuto en Tel-Avivo. Du ni vendu (eventuale en la Jerusalema Librofoiro en junio (*vidu punkton 6 sube*))

d) Eblas mendi la novan libron "Bridge of words" de Ester Shor. Jagil proponas fari grupan mendon (la libro kostas 50 NIS, sendokostoj 100 NIS, sed por pluraj ekz. la sendokostoj malaltiĝas).

4. Dratverejo (Jehoŝua)

La garanti-ĉekoj estas redonitaj al la antaŭa loĝanto. Pri la advokato ni devos demandi Eran.

5. Membro-kotizoj Kiel instigi ne pagantajn membrojn (Jehoŝua) – *pritrakti venontfoje!*

6. Librofoiro de Jerusalemo Junio 11-15, 2017 – en la iama trajnstacio (Amri)

Ĉu ni volas partopreni? Se jes - ni devas registriĝi, pagi, ktp. *Voĉdono: unuanime akceptita*

La venonta kunsido: lunde, la 6-an de Marto 2017, je 19:45

Protokolis: Gabi Zeevi